

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 19-an de novembro 2015 per Skype.

(aprobata dum la sekvanta interkonsiliĝo la 14an de januaro)

Partoprenis: Anne Karin Bondhus en Bryne, Mario Machlik en Tromsø, Ulf Lunde en Os, Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim (ĝis punkto 3), Herman Ranes en Trondheim, Cato Haugen en Oslo (dum punkto 2), Hilde Dahlberg en Mo i Rana (ekde punkto 5).

0. Tagordo

Aprobata kun eta ŝanĝo.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 29-an de oktobro

Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 29an oktobro: Aprobata.

2. Esperantonia (kun Skajp-kontakto al Cato Haugen).

a) Pro la planoj enkonduki impostojn je komercaj konstruaĵoj en Oslo, la estraro petas al Cato Haugen ŝanĝi la oficialan adreson de lia firmao Kulturcentro Haugen, tiel ke neniuj komercoj plu estu registritaj je la adreso de Esperantonia.

Cato promesas ŝanĝi la registritan adreson de sia firmao antaŭ la 1an de januaro.

b) La estraro proponas plialtigi la luprezon kiun pagas Kulturcentro Haugen por uzi la oficejon de NEL.

Cato diras, ke li ne kontraŭas tion, sed ke post kvar aŭ kvin monatoj li verŝajne ne plu bezonos la ejon. La estraro tiukaze decidis, ke NEL ne postulu lupagon de Cato por tiuj lastaj kvar aŭ kvin monatoj.

c) Cato afiŝis senpagan anoncon en anbud.no pri luado de la ejo. La estraro volas, ke li diskutu la enhavon de la anonco kun reprezentantoj de NEL, kaj eventuale ŝanĝu ĝin.

d) La domkomitato de Olaf Schous veg 12-18 kunvenos en Esperantonia mardon la 24/11 kaj pagos luon por tio.

3. Legaco Uhlen, statutŝanĝo

En 2011 NEL preparis novan statuton por la legaco Uhlen. Doninte konsenton per telefono, Rolf Bergh en NEFA poste decidis ne akcepti la statutŝanĝojn. Nun NEFA ne plu funkcias, kvankam ĝi ne estas formale malfondita. La tempo do ŝajnas matura por trovi el la tirkesto tiujn statutŝanĝojn preparitajn de NEL antaŭ pluraj jaroj.

La estraro petas al la legacestro Torstein Kvakland peti konsilojn de Stiftelsestilsynet, kion fari pri NEFA rilate al la legaco Uhlen. Kio bezonatas por pruvi, ke NEFA en realo ne plu ekzistas?

4. Ekonomio

La kasisto prezentis la enhavon de niaj fondaĵoj.

Beholdning

NOK ▼

Pr 18.11.2015

Aksjefond	Antall andeler ⁱ	Kurs ⁱ	Markedsverdi ⁱ
SKAGEN Vekst A	26,0870	1 979,8632 NOK	51 648,69 NOK
Rentefond			
SKAGEN Høyrente	1 250,1174	102,0026 NOK	127 515,23 NOK



Samlet verdi pr. 18.11.2015

179 164_{NOK} ⁱ

Ni volas fermi la kontojn de Lærerforbundet kaj Esperanto-nyt en DNB. Anne Karin petis la helpon de Douglas malplenigi la kontojn per retbanko, cxar laŭ la banko nur Douglas disponas la kontojn tie.

5. Landa Kongreso 2017

Ingebjørg Rambjør kontaktis Sandnes Vandrerhjem kaj ricevis pozitivan respondon. Tio ŝajnas kiel tre taŭga kunvenejo por nia Landa Kongreso. Anne Karin ofertas viziti la lokon kaj fari fotojn.

6. Informado

- Necesas kompili liston pri ricevantoj de Esperanto-Nytt (gazeto en la norvega lingvo elektronike dissendata tri fojojn jare). (Alternative, cxu uzi la liston de membroj de NEL-diskut?)

Farante tian liston, la estraro petos al Jardar krei propran retpoŝtadreson kiu estas dissendolisto por E-Nytt.

b) Mario estas mendinta reklamkartetojn por NEL cxe Vistaprint.

7. Datoj por venontaj interkonsiliĝoj

Post diskuto, ni decidis atendi ĝis la 14a de januaro.

8. Eventualaĵoj

Seminario 2016: Mario proponas inviti iun al nia per-skajpa seminario. Li havas tri proponojn: S-ro Lu Wunsch-Rolshoven (el Germanio, prezidanto cxe Esperantoland), Stefan MacGill (jam konata al pluraj el ni), aŭ Istvan Ertl.

Necesas trovi iun interesan temon, sed la invitotoj mem rajtu kundecidi pri tio.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2105h.

Raportis Ulf Lunde